

# La Espero

2005:3

## Sveda Esperanto-Federacio havas novan prezidanton

Svenska Esperantoförbundet har en ny ordförande



Sveda Esperanto-Federacio ricevis novan prezidanton. En la jarkunveno en Hanninge en majo Franko Luin transdonis la martelon al la nova prezidanto Bengt Olof Åradsson.

La prezidenta martelo de la federacio estas unika. En ĝi enestas ligno el la kvin kontinentoj. La ideo de Esperanto ja estas krei kontaktojn en la mondo.

Svenska Esperantoförbundet har fått en ny ordförande. Vid årsmötet i Hanninge i maj överlämnade Franko Luin ordförandeklubban till en nye ordföranden Bengt-Olof Åradsson.

Förbundets ordförandekluba är unik. I den ingår trä från de fem världsdelarna. Espeantos idé är ju att skapa kontakt över världen.

### Kontakto en praktiko

Kontakt i praktiken

Pli grave ol simboloj estas ke Esperanto funkcias en la praktiko. Gimnazianoj en Lerum per Esperanto havas kontakton kun litovaj gimnazianoj. En la bildo: Litovoj kaj svedoj antaŭ Amiralitata Preĝejo.

Viktigare än symboler är dock att esperanto fungerar i praktiken. Gymnasister i Lerum har genom esperanto fått kontakt med litauiska gymnasister. På bilden: Litauer och svenskar framför Amiralitetskyrkan.





## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694  
Monato 2005 • 93-a jarkolekto  
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:  
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: [esperanto@globalnet.net](mailto:esperanto@globalnet.net)

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2005: 200 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-  
avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00

E-post: [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)

Nätsida: [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider  
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2005:  
Direktansluten medlem 200 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-  
der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-  
rantisters Ungdomsförbund.  
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.  
Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Postgiro: 578-5

Nätsida: [www.esperanto.se/eldona](http://www.esperanto.se/eldona)

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.  
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Anita Dagmarsdotter

### Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgården 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: [esperanto@globalnet.net](mailto:esperanto@globalnet.net)

När kommer *La Espero* 2005?

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har bråd-  
skande information som måste komma ut senast ett visst  
datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

# Carl Mäsak

*Kie vi naskiĝis?*

En Mölndals lasarett en Göteborg, ta-  
men mi ne havas fortajn memorojn  
de tiu periodo.

*Kie vi loĝas?*

En Uppsala ĝuste nun. Mi unue venas  
de la okcidenta flanko de Svedio.

*Pri kio vi laboras?*

Mi havas diversajn taskojn en la Es-  
peranta mondo. Mi estas vicpre-  
zidanto, SEF-reprezentanto kaj TEJK-  
reprezentanto de SEJU; novelektita  
sekretario de ESU (Esperanto-Societo  
de Uppsala) – kaj mi kondukas akti-  
vecojn de la junulara Esperanto-  
klubo de en Uppsala. Mi ankaŭ plenu-  
mas certajn retajn taskojn en ĉiuj tiuj  
ĉirkaŭaĵoj.


Krom Esperanto, mi laboras en  
Uppsala Universitet pri retmajstrado,  
komputilprogramado, komputilad-  
ministrado kaj lernigado universitata.  
Mi ankaŭ estas studanto, je la pro-  
gramo "Bioinformatik" – ŝatiga mik-  
so de biologio, komputilscienco kaj  
matematiko.

*Kiujn interesojn vi havas krom Espe-  
ranto?*

Mi interesiĝas pri preskaŭ ĉio. Biolo-  
gio, matematiko, komputilscienco,  
kemio kaj fiziko; muziko, danco, ra-  
kontoj/fabeloj, desegnado, poezio kaj  
ludoj; psikologio, historio, sociologio,  
filozofio, religio kaj lingvoj. La granda  
malfacileco por mi estas trovi tempon  
por ĉiuj miaj intereso.

*Ĉu vi havas familion?*

Jes, du fratinoj kaj du gepatroj.



*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*  
Ekde 1999, mi pensas.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la  
Esperanto-movado?*

Mi ne vere konsideras min parto de la  
Esperanto-movado. Mi multe  
interesiĝas pri esperanto, sed preskaŭ  
neniom pri la Esperanto-movado.

*Ĉu ekzistas aliaj interesaĵoj pri vi?*  
Dependas je kiun vi demandas. :)

\* Mi preskaŭ ĉiam faras kaj diras  
tion kion mi volas.

\* Mi preskaŭ neniam iĝas kolera,  
eĉ kiam bezonate.

\* Mi ne havas poŝtelefonon, televi-  
dilon aŭ meblojn.

\* La plej bona afero en la mondo,  
mi pensas, estas vidi iun kompreni  
ion.

Skrive intervjuis: Leif Nordenstorm

## Estimataj samideanoj!

Mi antaŭ semajno revenis de Sveda Esperanto-Kongreso en Haninge. Pro  
tio mi estas ege ĝoja. Renkontiĝoj kun aliaj esperantistoj ĉiam ĝojigas  
min.

Mi ankaŭ iom hontas, ĉar mi scias ke tiu ĉi numero de *La Espero* aperos  
iom pli malfrue, ol laŭ la planoj, sed mia vivo estas plena de farendajoj.

Mi estas tre dankema, ĉar multaj esperantistoj sendis al mi materialon por  
la revuo. Mi ricevas tiom multe ke mi ne povas aperigi ĉion. Ĉiam ŝparu  
kopion, ĉar redakcioj ne kutimas resendi neuzitajn artikolojn.

Mi estas ankaŭ iom pensema. Diversaj homoj havas malsamajn opiniojn  
pri *La Espero*. Kelkaj volas pli da artikoloj en la sveda, "por ke oni povu  
montri la revuon al neesperantistoj". Aliaj volas pli da artikoloj en  
Esperanto, "por ke oni povu montri ke Esperanto funkcias" kaj "por ke  
oni povu ekzerci la lingvon".

En tiu ĉi numero do estas pli da artikoloj en la sveda kaj multaj mallongaj  
en Esperanto por la ekzerceto.

En la venonta numero de *La Espero* ni prezentos nian novan prezidanton.  
Agrablajn legadon kaj someron!

Via redaktoro



# Årets svenska esperantokongress ägde rum i Haninge

"Vad gör man egentligen på en esperantokongress?" Den frågan fick jag höra så fort jag berättade för vänner och bekanta att jag åkt till Haninge på esperantokongress. Mitt svar tog längre tid än frågan: För att få prata esperanto. För att få träffa gamla vänner. För att få planera hur vi skall arbeta för esperanto i framtiden. För att vara med på olika årsmöten. För att ha roligt o.s.v.

I år var vi 53 deltagare på kongressen på Folkets hus i Haninge. Redan på fredagkvällen kom många av deltagarna till EsperantoCentro i centrala Stockholm för att träffas och köpa böcker. På lördag började själva kongressen i Haninge. Svenska lärarens esperantoförbund, Esperantoförbundet och Kristna esperantoförbundet passade alla på att ha årsmöten. Det sistnämnda inleddes med gudstjänst.

Det största årsmötet var dock Svenska Esperantoförbundets, där både ombud för de anslutna klubbarna och direktanslutna medlemmar kunde vara med. Förbundet fick också en ny ordförande. Bengt-Olof Åradsson tog över klubban efter Franko Luin, som dock blir kvar i styrelsen.

På lördag eftermiddag föreläste Hartmut Traunmüller, professor i lingvistik, om sitt ämne på Stock-



Deltagare i Svenska Esperanto-Kongressen i Haninge 20-22 maj 2005.

holms universitet. Vi fick bland annat höra att teckenspråket är erkänt som modersmål för döva, men att allt färre använder språket eftersom man numera kan ge allt fler döva hörseln tillbaka. Kommunikation är inte bara kommunikation med rösten. Även kroppsspråk är en del av språkvetenskapen. Vid institutionen un-

dervisar man också i esperanto upp till B-nivå. Mycket annat intressant sades, men allt kan inte återberättas här.

På lördagskvällen hölls ett kvällsprogram, där undertecknad inte hade tillfälle att vara med, men deltagarna hade haft mycket trevligt.

På söndag fanns det tid för en diskussion om hur Svenska Esperantoförbundets hundraårsjubileum skall uppmärksammas. Några deltagare var rädda för att folk skulle fråga sig varför esperanto inte hade uppnått mer på hundra år. Andra menade att det nog inte finns något språk som har uppnått så mycket under sina hundra första år som esperanto.

Jubileet skall uppmärksammas genom att 2006-års kongress hålls i Malmö tillsammans med de danska esperantisterna. Dessutom skall vi försöka ge ut en skrift med olika författares och debatorers åsikter om esperanto.

Kongressen avslutades med en utflykt till nationalparken i Tyresta.

Du som missade att vara med i år är välkommen nästa år i Malmö!

**Leif Nordenstorm**



Medlemmarna i Rondo Langlet som varje månad skänker en summa pengar till Esperantoförbundet blev bjudna på en enkel mottagning.



## Nova prezidanto

Dum la jarkunveno de la Sveda Esperanto-Federacio, elektigis nova prezidanto Bengt-Olof Åradsen en Ny-näshamn. Li estas estrarano de KELI, Kristana Esperanto-Ligo Internacia, kaj redaktoro de ĝia gazeto 'Dia Regno'. Ceteraj estraranoj estas Sjoerd Bosga, Katja Ignatieva, Franko Luin, Wim Posthuma kaj Martin Strid.

## 70 studas rete

Sepdek studentoj anoncis sin por unika interreta universitata kurso pri Esperanto, kiu komenciĝos en la universitato de Umeå en norda Svedio ĉi-aŭtune. La kurso estas la unua en sia speco, ĉar ĝi estas organizata de granda universitato sed okazos nur en la reto. La kursa retejo, kiu estos alirebla nur por partoprenantoj, enhavas interalie son-dosierojn, babilejon kaj elŝuteblajn tekstojn. Simila kurso pri la ĉina lingvo pli frue allogis 120 studentojn.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

## Boklager till Göteborg

Förlagets styrelse har beslutat överföra lagret från Bromma till Göteborg.

Hyreskostnaden i Bromma skulle öka rejält och genom flyttningen blir läget fördelaktigare. Klubben i Göteborg har en stor lokal och genom om-disponering kan utrymmet delas med boklagret. Flytten äger rum under augusti och det behövs starka armar för att genomföra den. Frivilliga uppmanas kontakta Anita Dagmarsdotter, 031-55 53 37 el. [anidag@telia.com](mailto:anidag@telia.com)

## Personligt från Lesjöfors

*Esperanto-Gården är esperantorörelsens eget vandrarhem. Här kommer ett reportage om hur det är att vara frivillig medhjälpare där.*

Efter en färd genom det vackra skogs- och sjölandskapet steg vi av bussen och drog djupa andetag. Det var som att dricka källklart vatten, så rent!

För tredje gången den här sommaren - 2004 - var vi i Lesjöfors för någ-

ra dagar. Den här gången hälsades vi välkomna av Lennart Svensson, hans Barbro och av Kalle Elofsson.

Esperanto-Gården hade några gäster, så att det såg trevligt befolkat ut vid uppfarten. Vi upptäckte snart att det varit ett större sällskap som lämnat ett berg av lakanstvätt efter sig, så att vi hade sysselsättning lite varje dag. Sällskapet kom för övrigt tillbaka på hemväg och vi lämnade gården med ett lika stort berg kvar, när vi for. Men innan dess hade vi hunnit lära känna lite mer av Lesjöfors än tidigare.

Bergsmansgatan bjöd på extra utsmyckade trädgårdar. På andra sidan vattnet, dit man kommer genom att passera bakom museet, har man på senare år anlagt en promenadväg. Trollstigen, som den kallas, innebär en promenad på dryga fyra kilometer. Och det stiger ganska brant till en början. Längs vägen har man placerat sten- och trätroll, målat insekter och satt upp skulpterade fåglar. Några utsiktsplatser bjuder på vyer över byn och landskapet där bakom åt väster. Blåbären tävlade om uppmärksamheten, när vi var där i slutet av juli.

Kvällarnas färger var fascinerande, när solen försvann och tonade molnen i gult, rosa och violett mot en svagt orange himmel. En dag i augusti sällade sig Bengt Nordlöf också till skaran. Vi fyra - Kalle och Bengt, Soile och Anita - njöt en av dessa ljumma kvällar på en balkong med lite gott att äta och dricka, i doften av nyklippt gräs.

Oktober bjöd på sol, blå himmel och höstfärger. Esperanto-Gården hade sitt årsmöte med samling redan på fredag kväll. På lördagsmorgonen upptäckte vi nattis i kanterna på trädgårdsdammen. Några dagar senare låg isen kvar över hela dammen långt fram på dagen. Lennart Svensson for med Barbro på semester tisdag morgon. Han ringde hem och bjöd oss att ta älgkalvsfilé med kantareller ur frysen till middag. Och det blev fest.

Nytt år, och bilrallyt gav arbete i februari, fastän både Wim Posthuma och Karl Elofsson redan gjort en del då vi kom. Arbetsuppgifter hittar man alltid. Och det var bra promenadväder.

Mot några timmars arbete får man gratis logi, och arbetsuppgifter av många slag finns det. Vi hoppas att få sällskap av flera.

**Anita Dagmarsdotter och Soile Lingman**

## Tore Johansson (1917-2005)

Tore Johansson forpasis la 23an de marto. Li lernis Esperanton en 1938 kaj en la loka E-klubo renkontis sian estontan edzinon. Komence li aktivis en la laborista E-movado, poste en SEF. Dum jardekoj li estis delegito de UEA kaj kasisto de loka klubo, kiu en 1973 aranĝis SEF-kongreson en Kalmar. Li partoprenis en pli ol 30 UK-oj dum 55 jaroj, ekde Malmö 1948 ĝis Gotenburgo 2003. Lia vidvino, Signild, kaj unu el la tri gefiloj, Sten, aktive uzas Esperanton.

**Sten Johansson**

## Johano Paŭlo 2a (1920-2005)

Papo Johano Paŭlo la 2a dum sia 26 jara estrado de la Katolika Eklezio montris multajn amikajn gestojn al la Esperanto lingvo kaj movado.

Kiam li estis kardinalo en Krakovo, li gastis kunvenon de IKUE (Internacia Katolika Unuigo Esperantista) kaj li eĉ interesiĝis pri la lingvo. Okaze de la kongreso li volis celebri la Sanktan Meson kaj prediki en Esperanto kun permeso de la tiama papo Paŭlo la 6a. Sed neatendita okazo malebligis la intencion de la tiama kardinalo Wojtila.

Li ankaŭ uzis Esperanton dum dek jaroj en la salutoj 'Urbi et Orbi' por Paskoj kaj Kristnaskoj. Tiel Esperanto gajnis internan simpation kadre de la Katolika Eklezio.

La unuan fojon la Papo parolis en Esperanto dum publika ceremonio okazinta en Czestochowa, kadre de la monda junulara tago. La 14 -an de aŭgusto 1991, li salutis kaj bonvenigis la pilgrimantojn ĉiokaze per sekvantaj vortoj:

"Mi donas ankaŭ en Esperanto bonvenan saluton al la junaj pilgrimantoj el la tuta mondo, en ĉi tiu tago de universala frateco. Kiu vidas nin unuigitaj kiel filoj de unu sama patro en la nomo de Kristo, vero de la Homo."

**[www.ludanto.org](http://www.ludanto.org)**

*En la menciita retpaĝo oni povas ankaŭ aŭskulti la menciitan saluton.*



## Komunistoj kaj dekstruloj

Tri deputitoj de malgranda konservativa partio en la itala parlamento proponas ke Esperanto iĝu elektelebla lingvo en la ŝtataj devigaj lernejoj. La propono havas preskaŭ neniajn ŝancojn esti akceptita, sed laŭ Renato Corsetti ĝi ĉiukaze donas ŝancon publike diskuti Esperanton en Italio. La 11-an de majo italaj esperantistoj renkontiĝis kun altaj reprezentantoj de komunisma partio por peti ilian subtenon. Laŭ Renato Corsetti la renkontiĝo estis sukcesa.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

## Forpasis la kolekto de heredaĵo

En la aĝo de 87 jaroj forpasis Ludovikito, la elstara japana esperantisto ITŌ Kanzi, kiu antaŭ trideko da jaroj komencis kolekti ĉiun literon kiu iam lasis la plumon de Ludoviko Zamenhof. Pasintjare li metis ian punkton al sia granda laboro, eldonante la verkon "pri nia pvz-ado". Ludovikito neniam uzis majuskulajn literojn

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

## Esperantistoj ne sukcesis en la papa elekto

La nova estro de la katolika eklezio estis elektita de la kardinaloj en Vatikano posttagmeze la 19-an de aprilo. Inter la kandidatoj estis du, kiuj studis Esperanton: Miloslav Vlk, ĉefepiskopo de Prago, kaj Dionigi Tettamanzi, ĉefepiskopo de Milano. Precipe kardinalo Tettamanzi estis multfoje menciita kiel ebla kompromisa kandidato. En iuj listoj de plej verŝajnaj kandidatoj li aperis en la dua loko.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

# Renkontiĝo inter svedaj kaj litovaj gimnazianoj per Esperanto

*Ekde 2000 oni povas studi Esperanton en gimnazio en Lerum. Instruisto estas Folke Wedlin. En 2004-2005 partoprenis 25 studentojn. Oni interkonsentis pri amikiĝo kun Litova grupo el la urbo Marijampole kaj interkonsentis pri interŝanĝa vizito. Nordia konsilio subvencis per malavara subvencio. Jen raporto.*

Iom post la 9-a sabate la 30-an de aprilo 2005 niaj du grupoj renkontiĝis sur litovia grundo. La litovoj estis forveturintaj de Marijampole jam je la 4-a la saman matenon, dum la svedoj forlasis Gotenburgon la pasintan tagon antaŭtagmeze. Kiel kompreneblas, ni sentis nin ĉiuj iomete malaŭdacaj unuj antaŭ la aliaj, sed baldaŭ ni sidis ĉiuj en la litova buso veturante direkte al Neringa, la longa terlanga kiu apartigas la golfon Kurŝa Maro for de Balta Maro. Celo de nia vojaĝo, laŭ la renkontiĝa programo, estis la urbeto Nida. Laŭvoje tien ni vizitis faman litovian lokon, la tiel nomatan Sorĉistinon Monteton. Sur tiu monteto troviĝas multe da lignaj skulptaĵoj, kiuj en eksterordinara maniero rakontas legendojn pri Neringa. Baldaŭ poste ni atingis Nidan, kiu estas ege bela loko meze de verda pina arbaro ĉe la bordo de Kurŝa Maro. En Nida ni konatiĝis kun "zepe-linoj", tipe litova plado, kaj krome kun imponaj dunoj, kun sukceso, kaj kun la bela somerdomo de la nobelpremiita verkisto germana Thomas Mann.

La sekvantan tagon ni vizitis la intereseĝan Marmuzeon proksime al Klaipeda, kaj tie ni ankaŭ spektis tute nekredoblan prezentadon en la Delfe-nejo. Ni havis ankaŭ tempon por rigardi la malnovajn partojn de la urbo Klaipeda, iam (1629 - 1635) parto de Sveda Regno, tiam sub la nomo Memel.

Dum la veturo per pramŝipo al Karlshamn kiun ni ĉiuj kune faris, la litovaj kaj la svedaj gejunuloj pli bone interkonatiĝis, rakontante al si pri siaj

hejmlandoj, siaj hejmurboj kaj siaj intereso.

Alveninte al Karlshamn ni preskaŭ tuj pluveturis al Karlskrona, unu el la plej konataj kaj belaj urboj de Svedio. Ĉar kaj svedoj kaj litovoj bone konas la libron "La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson" fare de Selma Lagerlöf, kaj ĉar "Nilso Nano" fakte vizitas Karlskronan en unu el la ĉapitroj de la libro, ni pririgardis la marmilitan urbon sekvante la ŝpurojn de Nilso. Ni vidis la Fredrik-Preĝejon, sur unu el kies turoj Nilso surteriĝas kun la anseroj, ni rigardis la amatan svedan reĝon Karlo XI, kiun Nilso senintence ofendas, ni salutis maaton Rosenbom, kiu kaŝas Nilson sub sia ĉapelo, kiam la bubo forkuras de la kolerigita reĝo, kaj ni sekvis la tri en la Malnovan Ŝipfarejon, kie ankoraŭ troviĝas konstruaĵoj el la deksepa jarcento kune kun modernaj militŝipoj.

Dum nia lasta tago en Karlskrona ni vizitis la interesan Marmilitan Muzeon kaj miris la trembrilantan panoramon de la insularo antaŭ Karlskrona.

"Nia bildo de via lando" ja estis la temo de nia projekto, kaj dum nia fina kunveno en la junulargastejo de Karlskrona ni raportis kaj diskutis pri tiu bildo. Ni ankaŭ eldiris sinceran dankon al Asocio Nordio kaj Nordkontakt pro la ebligo de nia renkontiĝo kaj asertis, ke nia interŝanĝo ne pre daŭru; ni sentas, ke ni ambaŭflanke multon havas por doni kaj ricevi.

La stacia kajo de Karlskrona dum la adiaŭo estis plena de brakumantaj gejunuloj kaj plenkreskuloj, kiuj deziris reciproke al si feliĉan vojaĝon kaj bonan sukceson.

*Pli kompletan raporton oni trovas en intereso ĉe [www.nordkontakt.com](http://www.nordkontakt.com) Elektu "galleriet" kaj poste "esperanto".*



# Tri sameaj poeziaĵoj

## Mia patrio

Adiaŭ, mia patrio  
La padoj mallarĝiĝis  
Kontraŭvole, kun pezaj paŝoj  
mi devas lasi la lokojn,  
kie mi elkreskis  
En mia varma milda patra lingvo  
fremdaj vortoj prenis lokon

Restu en memoro, vi tendejo  
ludejo de infanĝ'  
Sono de sonoriletoj de l' eksvirboacoj de patro  
firme fiksiĝis en mia interno  
La boaca marko fiksiĝis surretine  
la sentoj en la koro

Restu en mia memoro, patra bastono,  
tendena ŝnuro, sleda maŝo, tenda sledo  
translokiĝo boacsleda ankoraŭ en mia mens'  
Apud rivereta bordo estas duona portaĵ'  
translokiĝas tra la valoj sur jungilkolum'  
Ne lasu la vivon hereditan  
Retenu ĝin per via tuta personec'

## La rajton vi perdis

Ŝirvundita estas lando de boac'

Ŝirita estas lando de boac'  
arbaroj, altoj distiritaj  
Vojoj tranĉas vundojn en la tero  
La arboj, protektantaj la likenon  
forhakiĝis  
La boaco perdis sian padon  
ne rekonas la odoron  
ne plu sekvas vojon de l' naturo.

## Relikvo de popolo

Mi estas relikvo de mia popolo  
Mi estas vagadanto en nia lando  
Mi naskiĝis en tendo alte ĉe la rando de l' monto  
Fremduloj rigardas min, kiel mi estus koboldo  
Kiam mi iras kun lazo surŝultre  
Kaj kun tranĉilo pendanta en mia larĝa zono

Mi estas sameo en mia Sameio  
Fremduloj, blankuloj, metis ŝpurojn en nia lando  
kaj konkeris ĝin  
malhelpis al la naturo ĝian iron, ruinigis ĝiajn riĉaĵojn  
Mi tamen vivas kiel relikvo de mia popolo  
Kiel vivis la patroj miljare

Mi estas sameo kaj fuĝadas  
antaŭ la blankulo, kiu forpeladis kaj subigis miajn  
patrojn,  
kaj kiu metis impostojn.  
Per malmolaj bendoj kaj per leĝa povo ili prenis nian  
landon,  
hakis la arbaron, detruis la akvojn  
timigis niajn birdojn  
tretis manĝaĵon de l' boac'

Mi estas relikvo  
de norda popola  
kaj staras senpova en mia lando  
Niaj dioj detruigis  
niaj tamburoj bruliĝis  
nia lingvo senvaloriĝis  
ŝanceliĝante ni nun marŝas  
kun la lazo surŝultre, kun la tranĉilo subzone  
la solaj iloj, kiujn neniu povas forrabi de ni

**Paulus Utsi (1918-1975)**  
Tradukis: **Leif Nordenstorm**

**Paulus Utsi (1918-1975)** naskiĝis en Lyngseidet, Norvegio. Li ĉefe loĝis en Svedio, somere en Vaisaluokta kaj vintre en Porjus. Li estis boacbredisto, slojdisto kaj verkisto. Liaj poemoj estas plenaj de nostalgia melankolio pri la sorto de la samea popolo. Laŭ Utsi la teĥnika kaj ekonomia evoluo minacis la samean kulturon. La ĉefaj poemaroj de Utsi estas *Giela giela* (1974, Ŝnurkaptu la lingvon) kaj la postmorta *Giela gielajn* (1980, Ŝnurkaptu per la lingvo). Utsi verkis paralele en la nordsamea kaj la sveda. Tiuj ĉi poemoj tradukiĝis el la sveda versio por la nacia vespero de la Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo en 2003.



## KALENDARO 2005

Junio 8. **Kafeja renkontiĝo en Stockholm.** Lyran, Ålgrytevägen 90, Mälardalen Tel. 646 80 50. Foriro de Bredängs tunnelbanestation je 17:45 h.

Junio 10. - 12. **Jarkongreso de Norsk Esperanto-Forbund.** Morokulien Vårdshus en Morokulien ĉe la limo inter Norvegio kaj Svedio. (<http://www.esperanto.no/nel/lk2005>)

Junio 22. **Kafeja renkontiĝo en Stockholm.** Gröna Stugan ĉe Löttsjön, Ursviksvägen 28, Sundbyberg, tel. 28 14 93. Metroo 11 al Hallonbergen. Aŭtobuso 504/506 unu haltejon al Löttsjön. Je la 18-a h.

Junio 27. - Julio 2. **Internaciaj someraj kursoj de Esperanto.** Esperanto Gården, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. (Tel: +46-(0)590-30909, fakso: +46-(0)590-30359, rete: [egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se))

Julio 5. **Kafeja renkontiĝo en Göteborg.** Je la 18-1 h. (Informiĝu pere de telefonrespondilo la semajnon antaŭe, tel 031-12 05 94.)

Julio 6. **Kafeja renkontiĝo en Stockholm.** Erstaterrassen, Erstagatan 1., tel. 714 61 31. Aŭtobuso 2 kaj 53. Je la 17-a h..

Julio 14. - 22. **15-a Internacia Esperanto Kongreso. Temo: Folkloro kaj Turismo.** Rigo, Latvio. (Mara Timermane: [mtimermane@hotmail.com](mailto:mtimermane@hotmail.com) aŭ [mtimermane@yahoo.com](mailto:mtimermane@yahoo.com))

Julio 15. - 21. **Baltiaj Esperanto Tagoj (BET-41)**

Julio 20. **Kafeja renkontiĝo en Stockholm.** Solstugan, Snoilskyvägen 37-39, tel. 656 80 85. Aŭtobuso 62 al Fredhäll, al la dua lasta haltejo. Je la 18-a h.

Julio 23. - 30. **90-a Universala Kongreso.** Vilno, Litovio ([www.uea.org/kongresoj/uk\\_2005.html](http://www.uea.org/kongresoj/uk_2005.html) / LOKA KONGRESA KOMITATO de la 90-a UK, Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, Litovio, tel.: (+370 37) 208 503, fakso: 228 616, rete: [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt))

Aŭgusto 3. **Kafeja renkontiĝo en Stockholm.** Rosendals vårdshus, Rosendalsterassen 3, Djurgården. Aŭtobuso 47 al Valdemarsudde. Je la 18-a h.

Aŭgusto 16. **Kafeja renkontiĝo en Göteborg.** Je la 18-1 h. (Informiĝu pere de telefonrespondilo la semajnon antaŭe, tel 031-12 05 94.)

Aŭgusto 17. **Renkontiĝo en Stockholm.** Ekskurso al Bergianska Trädgården. Kolektiĝo ĉe la enirejo de Naturhistoriska Riksmuséet je la 11:30 h. Lunĉo ĉe la restoracio kaj promeno al la ĝardeno. (Birgit tel. 652 60 24 aŭ Soile tel. 30 63 15.)

Septembro 16. - 18. **Sveda Esperanto-Instituto kunlabore kun Finna Esperanto-Asocio. " Esperanto en literaturo kaj muziko en Finnlando kaj Svedio".** Esperanto-Gården, Lesjöfors (Lars Forsman, 0586-548 11, [larsespo@yahoo.se](mailto:larsespo@yahoo.se) / Inga Johansson, 031-15 57 23, [sat\\_sverige@yahoo.se](mailto:sat_sverige@yahoo.se) / Loĝado: Lennart Svensson, Esperanto-Gården, 0590-309 09)

## Sommarens kurs på Esperantogården

27 juni-2 juli. Internationella sommarkurser i Esperanto i olika nivåer. Även för barn.

Esperanto Gården, SE-680 96 Lesjöfors, tel.: 0590-30909, fax:(0)590-30359, e-post: [egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se)

## Höstens seminarium på Espeantogården

16-18 september 2005. Bussresa från Stockholm på fredag. Olika programpunkter. Föfattarpresentationer. Musik, diskussioner m.m. Information: Lars Forsman, 0586- 548 11; Inga Johansson, 031-15 57 23; Bertil Andreasson, 0415-501 52; Bo Sandelin, 031-91 85 54; Siv Burell, 0302-411 49.

## Förlagsföreningen Esperanto upa Kallelse till extrastämma

lördagen den 17 september 2005 kl 9 i Esperanto-Gården, Lesjöfors

### På dagordningen

1 Styrelsens årsberättelse

2 Revisorernas berättelse

3 Fråga om fastställande av balansräkning

4 Fråga om beviljande av ansvarsfrihet åt styrelseledamöterna 5 Beslut i anledning av föreningens vinst eller förlust enligt balansräkningen.

6 Fyllnadsval av två styrelseledamöter

7 Motioner

## TRA LA LANDO

### Utställning i Göteborg

Klubben har en skärmutställning på Torslanda bibliotek och arbetar för att få ut den på bibliotek och kvartersgårdar under det närmaste året. Andreas Nordström har sammanställt den.

### En komputila revuo

La svedlingva 'PC FÖR ALLA' reklamper grandegaj literoj 'Lernu esperanto en 12 lecionoj'. Sube oni trovas: "Kurso de Esperanto" [www.cursodeesperanto.com.br](http://www.cursodeesperanto.com.br)

Ingrid Näsholm

## ANEKDOTO

### Kolekti brullignon

Estis aŭtuno kaj la indianoj demandis sian novelektitan tribestron ĉu la vintro estos malvarma. Bedaŭrinde li estis juna kaj nenion sciis pri kiel antaŭvidi la veteron, sed por ke la tribanoj ne estu en danĝero li diris ke estos malvarme, kaj ili tuj komencis kolekti brullignon.

Kelkajn tagojn poste li ekhavis brillan ideon kaj telefonis al la veterservo antaŭenmetante la saman demandon. Ili respondis ke ili vere atendas iom severan vintron kaj li tial urgis pri eĉ pli intensa kolektado de brulligno.

Pasis unu semajno kaj li denove kontaktis la veterservon kie ili nun admonis pri eksterordinare malvarma vintro, kaj terure timigita li ordonis pri kolektado de ĉio lignopeco trovebla.

Post ankoraŭ kelkaj semajnoj li ekpensis ke eble li povus lerni ion de la metodoj kiujn la meteologoj uzas kaj demandis ilin kiel ili povas esti tiel certaj pri venonta severa vintro. "Nu," respondis la meteologo, "ĉar la indianoj kolektas brullignon kiel frenezuloj."

Haldo Vedin




## Hibrida verko

**Paul Gubbins: Heksakloro unu komo tri. Dramo en tri aktoj. 63 p. Fonto-kajero 30, Chapecó 2005.**

Paul Gubbins plurfoje gajnis premiojn pri teatraĵo en la Belartaj Konkursoj. Per *Heksakloro unu komo tri* li akiris la unuan premion de 2004. Laŭ la antaŭparolo li verkis ĝin pro iama komento de Marjorie Boulton, laŭ kiu ne troviĝas tragedio en klasika senco inter la Esperantaj dramoj.

Efektive *Heksakloro unu komo tri* estas hibrida verko. Ĝi komenciĝas kiel relative normala teatraĵo en la naturalisma tradicio de la 20a jarcento, kun psikologia kaj socia enhavo kaj pli-malpli realisma dialogo. Kiel




tia ĝi estas sufiĉe bona, kvankam la dialogoj kelkloke suferas pro troa informemo de la aŭtoro, pro kio la scenoj ne ĉiam impresas tute konvinke. La bazo de la intrigo tamen estas tre bona. Temas pri moderna kaj grava temo, en kiu rolas ekologio, klasaj diferencoj kaj aliaj sociaj demandoj. Ni trovas nin en laborista hejmo de iu nordangla vilaĝo. Tamen, meze de la verko, pli precize sur paĝo 37, ĉesas la hodiaŭa teatraĵo kaj ni trovas nin kvazaŭ en ia Sofokla tragedio, kun Edipo-simila protagonisto, kvankam lokita en nian tempon. Komprenoble troviĝas kaŭzo de tia ŝanĝiĝo, ia subita aŭ finfina ekkonscio pri la signifo de iamaj agoj. Malgraŭ tio mi trovas la drastan ŝanĝon tre stranga el ĉiuj vidpunktoj: logika, estetika, psikologia, dramaturgia. Se temus pri intencita efekto, se la aŭtoro vere celus absurdan aŭ satiran efikon, eblus almenaŭ konsideri la aferon. Sed nenio kredigas tion. Supozeble Gubbins mem ne konscias la strangecon de sia hibrida verko. Plej kredeble li decidis plenumi la imagitan "mendon" de Marjorie Boulton, kreante Esperantan tragedion en moderna medio, kaj tiu decido pri ĝenro kondukis lin al la jena solvo. Ŝajne mankis al li kompreno, ke la interna logiko de lia elektita historio postulis ion tute alian.

Oni jam ofte konstatis, ke la Esperanta drama arto ege postrestas rilate al la prozo kaj poezio. Gubbins ja havas kelkajn el la talentoj bezonataj por iom ŝtopi tiun breĉon. Bedaŭrinde tamen aliaj mankas. Eble plej grave mankas al li fido kaj respekto al la kreitaj intrigo kaj figuroj. La fakto, ke kreis ilin la aŭtoro, ne donas al tiu la rajton trakti ilin kontraŭ ilia naturo, kiel okazas en *Heksakloro unu komo tri*.

Sten Johansson

## Böcker för både liten och stor




**Tibor Sekelj: Kumeuaua, djungelns son. Översättning från esperanto till svenska.**

Ett fartyg går på grund i Amazonas. Passagerarna står handfallna. Indianpojken Kumeuaua hjälper dem att överleva, att få loss fartyget och att reparera det.

Boken är skriven på esperanto och översatt till mer än tio olika språk

Böckerna kostar 50 kronor/styck eller 100 kronor för båda. Fraktkostnad tillkommer. Beställ böckerna från: EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm. [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)



**Leif Nordenstorm: Arne, la ĉefido. En esperanto.**

En la jaro 829 loĝas Arne kaj liaj amikoj en vilaĝo en Svedio. Lia avo estis vikingo. Aperas en la vilaĝo du fremduloj, kiuj rakontas pri nova dio. Kiuj cetere estas la viroj en la vikinga ŝipo, kiuj devigas la vilaĝanojn fuĝi el la vilaĝo? Ĉu liberulo kaj sklavo cetere povas fariĝi amikoj?

Respondoj vi trovos en ĉi tiu rakonto.